ADORU 182


1. Vin le-vu, por-do kaj lin-tel'.
La Re-ĝo ve-nas de l' ĉi-el',
de ĉi-uj reg-noj la re-gant',
por ĉi-uj gen-toj la Sa-vant'.
Kun Li a-pe-ras viv' kaj sav'.



2. Li estas justa sen erar'.
   Mildeco estas Lia ĉar',
   sankteco: Lia reĝa kron';
   la sceptro: amo kaj pardon'.
   Li metas finon al mizer'.
   Pro tio ĝoju ĉiu sfer':
   Benata la Sinjor',
   SAVANTO pro favor'.

3. Feliĉa urb', feliĉa land',
   se tuŝas ĝin la Reĝa pland'!
   Feliĉa ĉiu homa kor',
   se ĝin plenigas Lia glor'!
   Jen Li, la vera ĝojo-sun'.
   Premantaj ombroj fuĝas nun.
   Benata la Sinjor',
   KONSOL' en ĉiu hor'.

4. Sin levu pordo kaj lintel',
ke estu via kor' kapel'.
Vi ĝin preparu per ornam',
per pia sent', kun ĝoj' kaj am'.
Kaj venos via Reĝ' al vi,
aperos viv' kaj sav' kun Li.
Benata la Sinjor',
KONSOL', SAVANT', AŬTOR'.

5. Ho venu nun, Jesuo Krist',
en mian koron kun insist'.
Eniru kun la graco-plen'.
Nin tuŝu amo kaj seren'.
Spirito Sankta eĉ tra kriz'
nin gvidu al la paradiz'.
Al Via nom', Sinjor',
eterne sonu glor'.

MACHT HOCH DIE TÜR, DIE TOR MACHT WEIT • Unisono 8 • EG 1 • GL 107 RG 363 • KG 298 • EM 145 • LH 82 • M (Macht hoch die Tür): el Geistreiches Gesangbuch de Johann Anastasius Freylinghausen, Halle 1704 • germana T: Georg Weissel (1623) 1642 • E: Adolf Burkhardt 1968/1976 (strofoj 1-3, 5), Albrecht Kronenberger 2004/2010 (strofo 4) • kp. AK 32 • ↑ Psa 24,9-10; 43,4